

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2024

Jarkolekto 11 - Numero 3



*Erich Schöner A, XI (1901-1971)
Ludwig Spindelberger A
Oostenrijk, pfennig: Ottokar II 1251-1261 (Enns), Leopold V 1177-1194 (Krems) en Frederik II 1230-1246 (Wenen)*

ENHAVOTABELO

de julio 2024

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!: “Numismatoj de Esperantio, unuiĝu!”	3
Moneroj & medaloj	4
<i>IFEF-Kongreso Verona 1954</i>	
<i>100-jara datreveno de Esperanto en Bulgario</i>	
<i>Stanislav Kostka Neumann (1875-1947)</i>	
<i>6a Universala Kongreso de Esperanto Vaŝingtono 1910</i>	
Medalistoj: 35 Ernst Schomer (1915-2005)	9
Spikumaĵoj & suplementoj: Eminentamsideano Grégoir Maertens ...	11
Aspektoj de numismatiko: Alfabetoj por artefaktoj	13
Por spuremuloj: Nekonata Zamenhof-medalo!	15
Historiaj aspektoj: Oldaj monerpezilaj skatoloj	17
Valormarkoj & valorbiletoj: Valorkarto de la Foiro de Parizo 1936	18
Terminaro: Alfabeto listo (38)	19
Numismatika Forumo: Kolekti, esplori kaj priskribi!	20
El la gazetaro: Numismatoj de Esperantio, unuiĝu!	24
Retpoŝto	25
Anoncoj&eventoj	33

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

“Numismatoj de Esperantio, unuiĝu!”

Jam je la komenco de ĉi tiu tria numero de la dek-unua jarkolekto, ni devas peti vin, kara legant(in)o, tuj – sed nur momenton – ŝalti al la rubriko “**El la gazetaro**” sur paĝo 23, por lasi nin klarigi al vi la (*tute nekutiman*) titolon super ĉi artikolo!

Se vi, leginte ĝin, jam pensis, ke via redakcio, senprudentigita pro la aktualaj kaj diversaj politikaj balotoj en Eŭropo kaj aliloke, ekde nun uzos sloganon aŭ pli ĝuste “mokimitaĵon”, imitante famegan historian laboristan sloganon (*senĉese kaj sendube tre popularan i.a. en la rondoj de niaj SAT-samideanoj!*), vi tamen...eraras.

Tiun titolon ni “entuziasme” forŝtelis el artikoleto de la **centjara(!)** jarkolekto de la eminenta revuo “**Heroldo de Esperanto**” (“*Monata informa gazeto de Kultura Centro Esperantista*”) el numero kvar de aprilo 2024. Tiu en ĝi aperinta artikoleto estas ja, ekster la titolo, la “klasika” teksto de la ENA-varbilo. Por la redakcio de ENA tiu artikolo en “Heroldo” estas vere tre agrabla surprizo. Tiu gazeto senĉese akompanas la altnivelan, kulturan revuon “**Literatura Foiro**”, ege rekomendindan publikaĵon, kies fidela abonanto estas via servisto.

En nia aktuala rubriko “*El la gazetaro*” vi ankaŭ vidos foton de la averso de la belega arĝenta Zamenhof-memormedalo, eldonita de **Esperanta Civito**, pregita en 2009 en Meksiko. Tiun medalon, kun .999 da arĝento, *ni jam priskribis en jk. 6 (2019) n-ro 1, p. 10.*



Evidente la ENA-redakcio tutkore dankas pro tiu publikigo la redakcion de “Heroldo de Esperanto” kaj samtempe gratulas ilin pro la jubilea centjariĝo! Kroman dankon al la Civito.

Alitemen, karaj legantoj! Nia julia numero diversmaniere provas denove plaĉi al vi per la priskribo de “novaj” numismatikaĵoj en la rubriko “**Moneroj & Medaloj**”. Eble, ĉi-foje vi povos eĉ helpi nin klarigi la devenon kaj la signifon de provizore enigma – sendube olda – bronza zamenhofa medalo en la rubriko “**Por spuremuloj!**”

Alirubriken... ĉu vi jam sciis, ke **alfabetoj** eĉ taŭgas por konstrui turojn kaj alispecajn artaĵojn? Jen do artikolo en alia rubriko, kiu sendube igos vin kuntiri la brovojn!

Jes, denove ni celas montri kalejdoskopeton plenan je diversaj aspektoj de numismatiko, ĝenerale kaj esperante. Ni deziras al vi, dum trafolioj kaj legado, tre agrablan ekskurson...

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A2 - Esperantaj medaloj

IFEF-Kongreso Verona 1954



Lando: Italio
Metalo: kupro-nikelo
Diametro: 20 mm
Jaro: 1954



Kvanto: ĉirkaŭ 600
Pezo: 4 g (inkluzive pinglo)
Medalisto: *serĉata*
Diko: *serĉata*

Averso:

randskribe: "ITALIA FERVOJISTA ★ ESPERANTO ASOCIO"

Sube: "VERONA"

meze: bildo de rajdista statuo en Verona (Cangrande I della Scala)

dekstre – maldekstre: vertikalaj ornamaĵoj

Reverso:

meze: granda verda esperanto-stelo kun siglo IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

fone: (parte malantaŭ la stelo): la internacia simbolo de la fervojistoj: staranta trajnrado kun du flugiloj

supre: "VERONA ITALIO"

sube: "SESA KONGRESO"



Rimarko 1:

Tiun kongreson organizis la LKK de la 6a IFEF-kongreso en Verono. Ĉefa organizanto estis samideano Gino Corso.

Rimarko 2:



Tiu medaleto disponas pendigileton kaj estetike fasonitan ferpinglon; do, *laŭ aspekto kaj uzado* ĝi povas ankaŭ esti konsiderata kiel insigno.

Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Okaze de la 100-jara datreveno de Esperanto en Bulgario



Lando: Bulgario

Metalo: latuno

Mezuroj: 100 mm x 155 mm

Jaro: 1987



Kvanto: 10 (!)

Pezo: 1081 g

Medalisto: Bogomil Ĵivkov

Diko: 12 mm

Averso:

Portreto (busto) de d-ro L.L.Zamenhof, rigardanta dekstren. Ambaŭflanke limdifinita per du ornamaĵoj. Dekstre vertikale, per reliefaj literoj: “D-ro LLZAMENHOF
1859-1917”

Reverso:

Meze de la plaketo, skribita per reliefaj literoj: “1887 – 1987
ESPERANTO
★
1907 – 1987
BULGARA
ESPERANTISTA
ASOCIO”

Inter ambaŭ partoj troviĝas kvinpinta steleto. Ambaŭflanke la “teksto” estas limdifinita, samstile kiel en la averso, per du ornamaĵoj.

Rimarko 1:

La plaketo estis kreita samtempe okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto kaj de la 80-jara jubileo de Bulgara Esperanto-Asocio

Rimarko 2:

Ĝi estis havebla en leda skatolo, ornamita per “ora” kvinpinta stelo kaj per litero E.

Rimarko 3:

Oni enmanigis ĝin kiel premion aŭ donacon al eminentaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto.



S.K. Neumann estis fama ĉeĥa poeto, elstara lirikisto pri la naturo, kiel en lia *“Libro de arbaroj, akvoj kaj deklivoj”*. Krome li estis tradukisto, kritikisto (literatura, arta ...), ĵurnalisto, verkisto, politikisto, eldonisto, anarkisto (unu el liaj preferataj pseŭdonimoj estis “Antikrist”!), publikigisto, redaktoro...

En 1902 li iĝis kunfondinto kaj funkciulo de la Esperantista Klubo en Prago. Pri lia esperantisteco atestis ankaŭ doktoro Stanislav Kamaryt, elstara figuro de la Esperanto-movado, dirante: “Li regis la lingvon tiom, ke li povis ataki la verkiston K. Dostal-Lutinov per esperantlingvaj versoj.”

En la revuo “Nova kulto”, kies redaktoro kaj eldonanto Neumann estis, aperis en majo 1901 lia recenzo pri la ĉeĥa Esperanto-lernolibro de Čejka, Bilik kaj Holub kun rekomendo, ke oni lernu tiun ĉi “facilegan interkomprenilon”, por pli facile kontakti kun eksterlando.

En aparta esperanta teksto, probable verkita de Neumann mem, ni legas, ke “nia redakcio estas kompleza liveri al ĉiuj alilandaj esperantistoj informojn pri ĉiuj bohemiaj aferoj...”

Fontoj:

- Oldřich Knichal en la revuo “Esperanto” 7, 1975
- En Vikipedio, sub lia nomo oni trovas fragmentojn el “Libro de arbaroj ...”, esperantigita de Jiří Kořínek.

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Stanislav Kostka Neumann (1875-1947)



Lando: Ĉeĥoslovakio
Metalo: arĝento (0.700)
Diametro: 31 mm
Jaro: 1975

Kvanto: 5 000 (*stampo - brilaj*)
55 000
Pezo: 13 g
Medalisto: František David
Diko: 1,7 mm

Averso:

profilo de lia vizaĝo, tute dekstren
surskribo maldekstre: “S.K.NEUMAN”
surskribo dekstre: “1875-1975”

Reverso:

meze: la ŝtata blazono de Ĉeĥoslovakio (1960-1990)
surskriboj: “ČESKOSLOVENSKA SOCIALISTICKA REPUBLIKA”
sube: 50 Kčs (= ĉeĥoslovaka krono)



Rimarko 1:

ĉi monero (kun 5 000 stampo-brilaj ekzempleroj, nur por kolektantoj!) estis memoraĵo okaze de la 100a datreveno de lia naskiĝjaro

Rimarko 2:

55 000 ne-stampobrilaj ekzempleroj por la cirkulado estis eldonitaj

Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

6a Universala Kongreso de Esperanto Vaŝingtono 1910



Lando: Usono

Metalo: *serĉata*

Mezuroj: 76,2 mm x 38,1 mm

Jaro: 1910

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 14,17 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

supre: inter du laŭrobranĉoj la fasado de la t.n. Kapitolo en Vaŝingtono

surskribo (interrompita de bildo de globo kun verda stelo): “6^AINTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO (diagonale sur rubandeto)”

sube: “WASHINGTON 14-30 AŬGUSTO, 1910”

Reverso:

patentnomo de la firmao: “THE CHAS M. ROBBINS CO
ATTLEBORO MASS.”

Rimarko 1:

CO = Company = kompanio

Mass. = Massachusetts: Masaĉuseco, usona ŝtato en kiu situas la urbo Attleboro

Rimarko 2:

orkolora medaleto (ĉu orita?)

MEDALISTOJ

35 Ernst Schomer (1915-2005)



Post la bakalaŭreco Ernst Schomer en 1933 estis devigata labori por la germana ŝtato. Dum la dua mondmilito li iĝis plonĝaviadila piloto kaj batalis en la germana armeo kontraŭ Sovetunio. En 1945 li estis dum unu jaro militkaptita.


Post la milito li rekomencis pentri kaj ekspozicii. Dume li devis vivteni sin kiel libro-illustristo.

En 1953 li laboris en la okcidentgermana distrofilm-industrio. Li interalie kunlaboris kun la fama reĝisoro Alfred Bütow. En 1968 Schomer kreis la kulisojn por vico de filmoj kun grandaj buĝetoj. Post lia plej meritplena kaj belega laboro por la elstara filmo de Robert Siodmak “*Por la militakiro de Romo*”, li ĉesis labori en la filmindustrio.

Poste li nur pentris kaj kreis medalojn. En la germana urbo Minden li estis samurbano de Rikardo Ŝulco, la famega esperantisto kies monumentan kaj elstaran medalon li kreis.



Ĉi tiun eksterordinaran medalon ENA jam priskribis en jk. 7, n-ro 1, p. 11.



Al S-ro Grégoire Maertens

La redakcio tutkore dankas sinjoron Roland Rotsaert pro la interesaj informoj pri G. Maertens

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Eminenta flandra samideano Grégoir Maertens

Sinjoro Maertens, eminentulo de la flandra (Flandrio = norda parto de Belgio) esperantomovado, naskiĝis la 1-an de januaro 1924 en Bruĝo. Li estis tre aktiva esperantisto, kiu laboris i.a. kiel estrarano de UEA de 1977 ĝis 1989. De 1986 li estis ĝia prezidanto.

Li estis ankaŭ docento de AIS San-Marino kaj de 1992 ĝis 1995 ties trezoristo. Ekde 1993 Honora Membro de UEA.

Maertens lernis Esperanton kiel 16-jarulo (**li nuntempe estas 100-jarulo!**) kaj ekaktivis por la flandra kaj junulara movadoj. Li daŭre anis en la Komitato de UEA kaj en ĝia Eŭropa Esperanto-Centro, kiun li estis kunkreinta. Li kuraĝe stiris la financojn de UEA kaj iniciatis aŭdacajn entreprenojn, kiel la renovigo kaj vastigo de la Roterdama Domo, de Grafika Centro Antverpeno k.a.

Maertens estis ankaŭ kunfondinto de Flandra Esperanto-Ligo (FEL), ĝia estrarano pri financoj kaj konstanta konsilanto.

En 1993 li iĝis Honora Membro de UEA kaj en 2013 Honora Prezidanto de Institucio Hodler.

Tre valora internacia agnosko por li estis la (sur la antaŭa paĝo) de li montrata eksterordinara bronza medalo, pezanta 550 g.


En jarkolekto 2 numero 4, ENA jam montris kaj priskribis ekzempleron de tiu medalo el Hungario en luksa skatolo, donita en 1966 pro grandaj meritoj por la internacia movado ankaŭ al la bulgaro Nikola Aleksiev (1909-2002).

Laŭdon nepre meritas ankaŭ lia edzino Germaine, kiu senĉese helpis kaj subtenis la laboron de Grégoir. Kiel multaj aliaj meritplenaj edzinoj kaj amikinoj de esperantistoj, ŝi meritas internacian (kial ne eldonotan de UEA aŭ FEL?) novkreendan premion kaj renovendan medalon “Klara Silbernik”.

Bert

Fontoj:

- Vikipedio: “Grégoire Maertens”
- “Horizon-taal”, jarkolekto 55, numero 323, p. 4-5, 2023



Hieroglifa alfabeto



La Ŝtono de Roseto

⊥	⊥	⊥	⊥	⊥	⊥
7a	b	g	h(x)	d	h
⊥	⊥	⊥	⊥	⊥	⊥
w	z	h(h)	l	y	k
⊥	⊥	⊥	⊥	⊥	⊥
s	l	m	d(ð)	n	z(θ)
⊥	⊥	⊥	⊥	⊥	⊥
s	r	p	s	q	r
⊥	⊥	⊥	⊥	⊥	⊥
⊥(θ)	g(y)	t	7i	7u	s ₂

Kojnoskriba alfabeto



Nuntempa skulptaĵo

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Alfabetoj:brikoj kaj mortelo por artefaktoj



Dum la enkondukaj miljaraj epokoj de la homa evoluado, diversaj mejloŝtonoj, kiel la probable hazardaj iamaj novaĵoj koncerne la efikan uzon de fajro, la malkovron de la rado, la evoluon de la interhoma komunikado k.a., kaŭzis gravajn revoluciojn en nia (pra)historio.

Pri la unuaj fazoj de la akiro de lingvouzo ni nur povas diveni kaj fantazii, ĉar ne restis artefaktoj aŭ aŭdovidaj registraĵoj por precize pruvi iun ajn teorion tiurilate.

Tamen, la efike dokumentita mejloŝtono de la ekesto de la unuaj **alfabetoj** estis sendube unu el la plej gravaj eventoj por la tiamaj kulturoj kaj por la aktualaj generacioj, por studi la psikologian kaj kulturan progresojn de niaj pragepatroj. Alfabetoj estas nemalhaveblaj ŝlosiloj por malfermi la pordojn al la praa historio kaj al la estonteco de la homa specio.

Alfabetoj kvazaŭ similas al mesaĝoj el aliaj epokoj, eĉ el aliaj mondoj. Foje ili eĉ kaŭzas entuziasmigan surprizon, kiel per la malkovro kaj la deĉifrado de la egiptiaj hieroglifoj per la famega Ŝtono de Roseto, elfosita de la franca sciencisto Champollion. Dank'al li, sciencistoj kaj lingvistoj finfine povis vere kompreni la antikvajn egiptiajn surskribojn kaj dokumenti kaj klarigi ĝis tiam apenaŭ konatan kulturon.

Kreivaj personoj, kiel artistoj, ofte ŝatis kaj ŝatas uzi alfabetojn por simbole heroldi mesaĝojn, krei specialan etoson aŭ klarigi enigmajn eventojn. Bona ekzemplo estas la supre montrata esperanta medalo, en kiu la Babela Turo estis finkonstruita per “alfabeta mortelo”.

Ankaŭ en la esperanta kulturo oni do trovas ekzemplojn, kiel sur la supra, ora jubilea medalo, eldonita por memori la 125-jaran datrevenon de la Universala Lingvo. Al tiu medalo ni jam ĵetis rigardon en *jarkolekto 4, numero 2, paĝo 4*.

Ni ankaŭ rilate al tiu temo priskribis en *jarkolekto 9, numero 3, p. 18-19* neordinaran zamenhofan statueton en Bjalistoko kun eksterordinara fundamento, ornamita per diversaj orkoloraj literoj el la latina, la hebrea kaj la cirila alfabetoj.



Krome estas diversaj individuaj artistoj tutmondaj, kiel la barcelona skulptisto **Jaume Plensa**, kiuj estas fascinataj de la formaj kaj simbolaj valoroj de diversaj tipoj de alfabetoj. Lingvoj ĉiam estis la fundamento de la arta mondo de Plensa. Komence li uzis tekstojn, sekve apartajn literojn kaj aktuale eĉ miksojn de diversaj alfabetoj.

Laŭ li, kiu volas sendi al la homaro pozitivan, “ludovikan” mesaĝon pri la neceso de amikaj homaj rilatoj, alfabetoj, eĉ unuopaj literoj, tre akurate esprimas la fonon, la tradicion de diversaj kulturoj. Tra la historio, literoj, signoj kaj alfabetoj evoluis tiel, ke ili nun montras la homan konduton rilate al la evoluanta realeco. Se artisto brodotekstas diversajn alfabetojn, li montras tion, kio estas homa kaj ankaŭ la belecon kaj neceson de diverseco, kiel en la naturo.

En la suba bildo ni montras lian homan kreaĵon, konsistantan el literoj de ok diversaj alfabetoj: la latina, la greka, la araba, la hebrea, la ĉina, la japana, la rusa kaj la hinda.



POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.

Nekonata Zamenhof-medalo! Ĉu nur provizore enigma, dank' al vi?



Jen el nia foto-arkivo bronza (?) medalo, unu- aŭ duflanka, pri kiu ĉiuj informoj estos interesaj kaj necesaj por povi priskribi la objekton por la estonta KATALOGO!

Se vi povus pli detale informi nin, ni tutkore dankos vin!



Skatolo monerpezila el 1581



Zelanda monerpezilo el 1622

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Oldaj monerpezilaj skatoloj

Jacques Priem

membro de Numismatica Herentals

1. Monerpezila skatolo el 1581

Unu el la plej oldaj skatoloj kun monerpeziloj datas el la 16a jarcento. Ĉi ekzemplero, kompilita kaj aranĝita de la antverpenano (*Antverpeno estas belga havenurbo...*) Nicolaes du Mont, datas el 1581. La monerpezilo estas el latuno. En la skatolo troviĝas 36 peziloj, unuope rilataj al 36 diversaj oraj moneroj tiam validaj, i.a. malpezaj moneroj de ĉirkaŭ 1,52 g ĝis “monstraj” 10 kruzadoj je 35,36 g.

La aldonitaj surskriboj super la pezindikoj estis metitaj laŭlarĝe, tiel ke necesis turni la skatolon kvaronturniĝe dum la uzado. Do: la pezilo maldekstre, la moneroj dekstre. La ora monero estis metita sur la platan triangulan pesiltelereton, la pezilo en la malprofundan, rondan telereton.

Sub klapeto (kun dato 1581) troviĝas etaj platformaj peziloj, jen tiel nomataj “asetoj”. Per ili oni povis pesi kiugrade la monero eventuale estis tro malpeza. Eta malpezo estis akceptata, sed kun iom malpli da valoro (prezo). Por povi fari la foton, la vekta pesilo (ĉi-kaze t.n. “trumpetpesilo”) estis elprenita el la pesilujo kaj metita sur la fermoplaton.

2. Zelanda monerpezila skatolo el 1622

Ĉi figuro apude montras la maldekstran parton de skatolo farita en Middelburgo (Nederlando) en 1622. Por uzi tiun tipon ne estis bezonata kvaronturno, ĉar la pezindikoj troviĝas super la subdividaĵoj. Do, la peziloj troviĝis en la direkte rilataj subdividaĵoj kaj ili respondis al la surskriboj. Tiuj surskriboj indikis la monerojn kiel “kompletan”, “duonon”, “kvaronan” ktp. Ekzemple la “Henricus” (vidu maldekstre, je la tria malsupren) por la “Noblo” de Anglio, dekstre la “½ Henricus” por la “½ Noblo” ktp.

Por povi pesi arojn da moneroj, t.n. “bankpeziloj” estis uzataj. Kiam “granda mono” ankoraŭ estis stampita laŭ oraj kaj arĝentaj tipoj, ĉe tiuj moneroj laŭlitere la valoro respondis al la pezo en oro (aŭ arĝento). Tiaj moneroj estis nur akceptataj, se ili estis ne tro eluzitaj kaj ne intence malpezigitaj per “randotranĉoj”.

Ekde la mezo de la 13a jarcento, post longa interrompo, denove ekcirkulis oraj moneroj, unuavice la “fiorino” (= floreno) el Italio. Popularaj, bone akceptataj moneroj estis imitataj en diversaj aliaj urboj kaj regionoj. Tiel aperis en la cirkulado multaj grandaj oraj kaj arĝentaj moneroj, ĝenerale akceptataj ankaŭ en foraj regionoj.

Ekde la 14a ĝis la 19a jarcentoj - por kontroli la pezon - estis uzataj monerpezilaj skatoloj, do kestetoj kun vekta pesileto kaj monerpeziloj por kontroli diversajn validajn monerojn kaj - ekde ankoraŭ ne ekzakte konata momento - ankaŭ areto de “asetoj” por kontroli la subpezon de moneroj. Se mankis nur malmulte, oni devis pagi etan alpagon al la akceptanta persono.

Eknederlandigis Bert

Tutkoran dankon al nia numismata kolego Jacques Priem, membro de Numismatica Herentals (Belgio)!

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Valorkarto de aĉetanto okaze de la Foiro de Parizo en 1936



TERMINARO

Alfabeto listo (38)

alĝustigo: malpezigo de rondelo kiu estas tro peza, fajlante aŭ detranĉante iom da metalo. Se ĉi tio ankoraŭ estas videbla sur la monero, ĝi estos refarata kiel alĝustiga marko.

altvalora metalo: metalo kiu estas tre stabila kaj ne facile korodas. Tial oro kaj arĝento estis ofte uzataj por produktado. Moneroj en plateno estas tre maloftaj, ĉar plateno estas tro malfacile fabrikebla. Nuntempe korodo estas kontraŭbatalata per specialaj alojoj.

ĉiujara serio: komerca produkto de eldono de moneroj el la sama jaro, enhavanta la diversajn monerojn de unu kalendara jaro, ĉu jes aŭ ne en kombinaĵo kun memormoneroj aŭ pseŭdomoneroj aŭ medalo en pakajo

fiduciario: mono kies nominala valoro ne baziĝas sur la pezo kaj enhavo de valormetalo, sed sur la leĝo, t.e. sur fido je la mentomajstro

imitaĵo: private farita monero, kiu aspektas kiel oficiala monero, sed eventuale povas esti falsaĵo, reklamilo aŭ ĵetono.

interna valoro: valoro de la metalo aŭ alojo de la monero. Aparte grava por komercaj moneroj, pseŭdomoneroj, medaloj kaj ĵetonoj sen arta aŭ historia valoro.

jarindiko: esence la jaro, en kiu monero estis farita. Tamen, ĝi povas indiki fisikan jaron (Francio) aŭ la jaron en kiu la afero estis rajtigita (Hispanio).

kronita: monero aŭ medalo provizita per krono. Kutime super kapo, busto aŭ blazono.

martelita: frapita kun uzo de tekniko en kiu unu stampilo estas muntita sur amboso kaj la alia stampilo sur mallonga stango. La rondelo estas metata inter la du stampiloj kaj la monero frapata per bato(j) de martelo.

nomado: nominala valoro kiel deklarita sur la monero

nominala valoro: vidu "interna valoro"

premiita: provizita per laŭrokrono. Kutime kapo aŭ busto. Laŭ tradicio, la gajnintoj de Olimpikoj ricevis girlandon el laŭrobranĉoj kiel nuran rekompencan. Laŭrokrono do estas signo de venko.

ripa rando: rando de monero aŭ medalo, havanta malgrandajn, vertikalajn ripojn. Ankaŭ nomata segildenta rando, kvankam dentringoj estas triangulaj.

rolantaro: monero aŭ ĵetono, akirita per fandado de metalo en argilaĵo. Ĉefe tio okazis ĉe pli malnovaj orientaziaj moneroj kaj ĵetonoj.

segildenta rando: vidu "ripa rando"

NUMISMATIKA FORUMO

Esperantistoj ĉiam trovos ion por kolekti, esplori kaj priskribi!

Kolektado de poŝtkartoj, libroj, glumarkoj, revuoj aŭ plej diversaj aliaj esperantaĵoj estas ŝatata okupo de multaj esperantistoj. La faka asocio de esperantistaj filatelistoj kaj kolektantoj renovigis sian ampleksan retejon. Lige kun tio ni petis Elda Doerfler kaj James Rezende Piton rakonti pri la agado de ELF-AREK.

Elda Doerfler estas la prezidant(in)o de ELF/AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj), faka asocio fondita en 1968 kaj kunlaboranta kun UEA. Ŝi estas ankaŭ la ĉefredaktoro de *La Verda Lupeo*, la asocia bulteno. Elda tre aktivas en Triesta Esperanto-Asocio (Italio), kies bultenon ŝi ankaŭ redaktas, kun multaj esploroj surbaze de poŝtmarkoj, glumarkoj, bildkartoj.



James Rezende Piton estas komputilisto por sciencaj eksperimentoj en Brazilo kaj mastrumas la ĵus renovigitan retejon de la asocio. Li havas filatelan kolekton pri Esperanto, kiu partoprenis grandajn ekspoziciojn. Krome li okupiĝas pri la esplorado de la plej fruaj poŝtkartoj pri esperantistoj kaj Esperanto.

Libera Folio: Kial, laŭ via supozo, esperantistoj tiom ŝatas kolektadon?

Elda Doerfler: Sufiĉe granda kvanto da esperantistoj konservas esperantaĵojn, arigitajn dum la diversaj kongresoj, renkontiĝoj tra la mondo, ĉar tiuj estas memoraĵoj pri la propra vivo esperantista. Tamen indas pripensi, kiom da personoj posedas ekzemple imponajn kolektojn de libroj, pri kaj en Esperanto; tiuj, krom estis legemuloj, estas ankaŭ kolektemuloj, kies celo estas ne nur ĝui legindaĵojn sed ankaŭ uzadi ilin por disinformado pri nia lingvo. Oni devas danki ilin, ĉar tiel ne perdiĝas malnovaj aŭ novaj tekstoj, tre valoraj dokumentoj pri la Esperanta literaturo.



Elda Doerfler

Plie ni pensu pri la ĵurnaloj; ekde la apero de la unua revuo en Esperanto, societoj kaj individuoj strebis por ke ne manku eĉ unu ekzemplero sur iliaj bretoj: ĵurnaloj rakontas la tutan historion de la Esperanto-movado. La kolektinda materialo kompreneble estas tre varia, dependas de la unuopulaj interesoj, gustoj aŭ preferoj. Ekde mia esperantistiĝo en 1973 mi mem emis amasigi ĉion, kio bonodoris je verda stelo.

James Piton: Mi kredas, ke kolektemo estas trajto de granda parto de la homaro, kiel subteno al memoro; familiaj memoraĵoj, vojaĝo-suveniroj, fotoj, libroj kaj tiel plu. Sed, por esperantistoj tiu kutimo havas kroman funkcion: esperantaĵoj pliproksimigas la kolektanton al Esperantujo. Por multaj estas malfacile regule troviĝi en Esperanto-medio, do kun siaj kolektoj oni povas senti sin “ĉirkaŭata” de Esperanto.



James Rezende Piton

Mi, persone, havas aldonan celon pere de antikvaj E-bildkartoj, nome venigi el la pasinteco iom de la vigleco, la etoso kaj la iniciatoj de niaj prauloj, kiel inspiro al la nunaj generacioj. Tiu riĉa historio kaj rememoroj pri antaŭuloj, kiel okazas en ĉiuj kulturaj komunumoj, distingas nin de la aliaj planlingvoj.

Kiaj aĵoj estas la plej popularaj objektoj de kolektado inter viaj membroj? Kiel tio ŝanĝiĝis dum la jardekoj?

Elda Doerfler: La preferataj objektoj estas, laŭorde, la Esperanto-filatelaĵoj: poŝtmarkoj, stampoj, tutaĵoj ks. Sekvas duavice glumarkoj kaj insignoj, fine E-bildkartoj plej malnovaj, **medaloj kaj moneroj**. Tamen, multaj sin dediĉas al plej diversaj kolektobjektoj: skribiloj, glasoj, kalendaroj, komercaj reklamiloj en Esperanto el la pasinta jarcento, telefonkartoj ks. Aliaj fervore serĉadas Ido-aĵojn, Volapukaĵojn, Interlingvaĵojn ktp.

Mi notis tamen, ke en la plej lastaj jaroj oni ne plu tiom interesiĝas pri poŝtkartoj, poŝtmarkoj aŭ stampoj. Poŝtkartoj estas malmulte uzataj, kvankam okaze de kongresoj kaj konferencoj ofte estas eldonataj la tiel nomataj “individuj” aŭ “personigitaj” poŝtmarkoj, kiuj, malgraŭ sia duonoficialeco, daŭre altiras la atenton de niaj filatelistoj. Pli kaj pli malaperas la kutimo surglui sur la korespondaĵojn Esperantoglumarkojn, pro la manko de paperaj korespondaĵoj. Mi jam nun sentas malĝojon, pensante kiam UEA decidis ne plu eldoni glumarkojn okaze de UK-oj. Tion ĉi mi timas, ankaŭ pro la fakto, ke tio senvalorigos mian kolekton; ĝi fariĝos nekompleta!

Jen ĉidekstre oficiala poŝta stampo uzata por klarigi la rifuzon de korespondaĵoj en poŝta trafiko (pro cenzuro en Germanio, 1939); inter la kialoj, en la kvara linio, legeblas: “Lingvo, Planlingvo, Esperanto, Stenografio ktp. ne permesata.”



Kion vi povas diri pri la historio de kolektado inter esperantistoj, kaj pri la historio de via asocio?

Elda Doerfler: Ofte mi diras, ke kolektemo estas viruso kiu porĉiame infektis onin, de kiu malfacile oni liberiĝas. Oni povus eĉ supozi ke tiu manio ekzistas ekde la homa ekesto sur ĉi tero – prahomoj certe kolektis belajn, brilajn ŝtonojn, aŭ dentojn de ferocaj bestoj, aŭ ... lasu vian fantazion libere flugi! Sed kiu estis la ĉefa celo de niaj pioniroj? Disvastigi Esperanton kiel eble plej amplekse kaj per ĉiaj rimedoj: bona rimedo ekzemple estis la poŝtaj kartoj, sur kies fronto eblis aperigi belajn grafikaĵojn, blanka-nigrajn, unuope mankoloritajn, tutkolorajn laŭ oniaj financaj ebloj – propagandantajn por Esperanto.

Fine de la 1800-aj oni komencis eldoni glumarkojn, arte desegnitajn, kies bildoj rilatis ĉefe al LLZ aŭ al esperantaj eventoj ĉiaspecaj. Tio supozigas, ke esperantistoj tutcerte multnombre tiujn reklamilojn aĉetis por dissendadi tra la mondo, kaj ankaŭ por propra kolekto. Tiel same certe okazis pri la kongresaj insignoj, aŭ aliaj broĉetoj kun verda stelo, aŭ pingloj por kravato ks., kiuj servis ankaŭ por facila interkonebleco. Same tiuj ĉi certe estis interesaj kolektindaĵoj, ankaŭ ĉar en tiuj foraj tempoj oni farigis **artismajn medalojn**.

James Piton: Oni tre frue kreis organizojn pri kolektado per Esperanto. Elda faris belan kompilaĵon pri la organizoj de E-kolektantoj, kaj tio baldaŭ estos videbla en la retejo de ELF-AREK. Esperanto-Ligo Filatelista estis fondita en 1964 kaj AREK en 1968. Ili kuniĝis en 1975, kaj estis tre kompetentaj kaj kleraj aktivuloj en ambaŭ originaj organizoj. Ili konstruis ELF-AREK tra la postaj kvin jardekoj. Inter la servoj, stampo-banko, kies vendoj estas profitaj al la asocio. Nia organo “La Verda Lupeo” prezentas la nove aperintajn filatelaĵojn, malkovritajn esperantaĵojn, rezultojn de esploroj de kolektantoj k.m.a.

Unu el la bildkartoj el granda serio de karikaturaj de tiamaj korifeoj de la movado (1913) – ĉiu el ili estas plena je movadaj kaj kulturaj aludoj. Pli pri ili eblas legi en [Vikipedio](#).



Kiuj estis la unuaj konataj kolektantoj en la Esperanto-movado, kaj kion oni ĝenerale kolektadis antaŭ 100 aŭ 120 jaroj?

James Piton: Librojn, tutcerte. Mi ŝerce diras, ke la kolektado de esperantaĵoj komenciĝis kun la eldono de la Dua Libro de Zamenhof ... Fama estis la granda privata biblioteko de la armeno Georgo Davidov en Saratov (Rusio), kiu penis akiri ĉion eldonitan en aŭ pri Esperanto. Oni povas vidi en nia retejo du ekslibrisojn el lia kolekto. Tiel vasta ĝi estis, ke en 1908 kaj en 1911 oni en Berlino eldonis katalogojn pri ĝi!

Poŝtkarto el 1912 montras la hungaran aktivulon Otto Ámon antaŭ lia impona kolekto de Esperanto-afiŝoj sur muroj. Sed poŝtmarkojn oni kolektadis jam en la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento. Tiam glumarkoj kaj poŝtkartoj ekfuroris kiel modo en la komenco de la 20-a, do kiel

“kromproduktoj” de la korespondado mem inter esperantistoj, oni kompreneble plej ofte turnis sin al tiuj tri kategorioj, kun prefero al la diversaj specoj de filatelaĵoj, esperantaj aŭ ne.

Kiam ekaperis la unuaj filatelaĵoj ligitaj al Esperanto?

James Piton: En la 8-a UK en Krakovo, 1912, tiam parto de Aŭstrio-Hungario, oni uzis poŝtan memorstampon. En 1925, Sovetunio omaĝis Aleksander Popov (1859-1906) per poŝtmarkoj kun titolo en Esperanto: “Inventisto de Radio – Popov”. Tiu eldono iel markas la komencon de la “E-favora jardeko” en Sovetunio, por tiel diri, kun centoj da ordinaraj poŝtkartoj kun esperanta titolo “Poŝta Karto” aldone al la franca. Ĝis Stalino ŝanĝis sian politikon pri internaciaj rilatoj ... Kaj la vere unuaj E-rilataj poŝtmarkoj eldoniĝis en 1926 (por la 6-a SAT-Kongreso en Leningrado, kun la titolo “VI Internacia Proletaria Esperanto-Kongreso”) kaj en 1927, okaze de la 40-jariĝo de Esperanto. En tiu poŝtmarko estas videbla bildo de Zamenhof en medaliono.

Ĉiam pli multe el la agado de la Esperanto-movado troviĝas en la reta mondo, kaj malpliĝas kolekteblaj fizikaj objektoj: poŝtmarkoj, poŝtkartoj, eĉ revuoj kaj libroj. Kion oni kolektos en la estonteco?

Elda Doerfler: Mi tute ne kredas ke malaperos ĉio, kion ni nomas “Esperantaĵo”. Eble mi estas tro esperema, mi ja estas esperantisto, sed mi fidus je la sentema flanko de la homoj. Oni ne povas malaperigi ĉion konkretan, tute ne eblas. Poŝtmarkoj plej probable malaperos, ĉar baldaŭ neniu plu skribos “mane”: ĉio okazos rete. Ankaŭ poŝtkartoj malaperos, sed libroj kaj revuoj, ne, tute ne! Teni libron en la manoj, tuŝi la paperon, flari ĝian odoron, trafoliumi ĝin por relegi specialan impresan frazon, sen ke la okuloj larmu pro la ekrana lumo ...

Sed kolektemuloj ĉiam ekzistos: mi parolas pri kolektemuloj esperantistaj, ĉu ne? Jes, se ili ne plu havos modernajn kolektaĵojn, ili reiros al la pasinteco, kaj serĉados interrete, en la aŭkcioj, la poŝtkartojn de la malnovaj tempoj, la glumarkojn pri UK, la insignojn de la fruaj 1900-aj jaroj, la librojn el flava papero, kiuj rakontos pri la historio de ELF-AREK.

James Piton: Oni ankoraŭ havos la miliardojn da objektoj de la pasinteco por flegi. Pri la estonteco, estas zorgo, kiu koncernas ne nur kolektemulojn, sed la estontan studon de historio. La tradicia fonto por esploroj troviĝas en jarcentoj da konservado de konkretaj objektoj, manuskriptoj, korespondaĵoj, dokumentoj, libroj en ... kolektoj. Kio post la ciferecigo? La teknologio helpas en tiu konservado kaj disvastigado, sed averaĝe en ĉiu dua jardeko la teknologio pri datumstokado anstataŭiĝas. Ĉu vi plu sukcesas legi la enhavon de viaj malnovaj komputilaj moldiskoj kaj disketoj? Tio estas la kerna demando pri cifereca konservado. Senzorgo en la konservado aŭ mastruma mispaŝo povas pereigi tutan enhavon. La konservado en “nuboj”, en sekuraj komputilaj serviloj, iom mildigas tiun riskon.

“Libera Folio” je 2020-03-03 en kulturo

Numismatoj de Esperantio, unuigu!

En 2013 estis fondita la fakgrupo Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) kun la bulteno *Esperanta Numismatiko*. La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantio la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke E-numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre studendaj artefaktoj. Kroma celo estas eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La memborkvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 155 individuaj membroj kaj 25 organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo. Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!



Averso de la arĝenta memormedalo preĝita de la Esperanta Civito en Meksiko, 2009. Kun la valoro de 90 svisaj frankoj ĝi cirkulas kiel interna monero, nomata *speso*. La reverso montras la Civitan blazonon.

Tial oni rajtas aliĝi senpage: sufiĉas respondi: *Mi konsentas aliĝi*. Krome la reta bulteno estas senkosta. Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas elŝuti la aperintajn numerojn, sekve vi ricevos ĉiujn aperontajn numerojn. (kvar-foje jare). bert.boon@skynet.be

El: "HEROLDO DE ESPERANTO", Numero4 (2353) 100a jaro

aprilo 2024, p.3

La redakcio de "Esperanta Numismatiko" tutkore dankas la kolegojn ĉe la redakcio de "Heroldo de Esperanto"

Vidu ankaŭ jk. 6, n-ro 1, p. 11

REPOŝTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

15.04.2024 11:48

Kara Rafaelo,

Multan antaŭdankon pro via intenco kunlabori kiel ano de la redakcia volontularo! Tamen, tute ne urĝas verki kaj sendi tekston; tio ne estu devigo, sed agrabla tasko, ĉu ne?!

Kroma peto hodiaŭ estas - ĉar vi ja estas numismato - ĉu vi eble konas esperantajn medalojn eldonitajn pasintecce en Brazilo. Se jes, ENA eble povus priskribi ilin por la unua, nuntempe jam preparata Katalogo.

Mi kore kaj numismate brakumas vin!

Bert

27.04.2024 16:28

Bonan matenon amiko Bert, pardonu pro la malfrua respondo. Mi esploros, ĉu estas medaloj kun esperanta temo ĉi tie en Brazilo kaj mi kontaktos tuj kiam mi havos iom da informoj.

Fartu bone!

Rafael Augusto de Mattos Ferreira.



16.04.2024 20:08

Kara amiko Jozefo,

Ke flugas la tempo ankaŭ pruvas la dua numero de la dek-unua jarkolekto. Jen do mi, denove kun mia ege kutima peto al vi, se iom da tempo restos al vi, provlegi "severe kaj senkompatate" miajn tekstojn. Multan antaŭdankon!

Amike kaj numismate,

Bert

18.04.2024 16:04

Kara Bert,

jen la provlegita versio de la dua numero ĉi-jara.

Ĉi-foje mi iom malfruis, ĉar tra la optika kablo ne venis signoj dum du tagoj. Kiel evidentiĝis, la perturbon kaŭzis loziĝinta ŝtopilo ĉe la enkursigilo.

Kun amikaj salutoj: Jozefo



17.04.2024 14:30

Karaj IFEF-samideanoj,

Kiel redaktoro de "Esperanta Numismatiko", mi petas vian helpon por povi akurate priskribi kongresan medaleton, eldonita de via fakgrupo. Jen la bildo kaj la mankantaj detaloj:



I F E F – medalo

La informoj kiuj mankas al ni:

Metalo
Eldonjaro
Eldonkvanto
Diametro
Pezo
Medalisto: nomo kaj biografio

Krome ni serĉas informojn kaj fotojn de **aliaj de IFEF iam eldonitaj medaloj, ŝetonoj, valorbiletoj ktp**, ĉar ni estas kompilantaj plejeble multajn numismatikaĵojn por baldaŭ eldoni la **unuan numismatikan katalogon de Esperanto**. En ĝi viaj medaloj pri kongresoj kaj aliaj eventoj nepre meritas propran lokon!

Aldone ni kunsendas la lastan numeron de la revuo por prezenti ENA al vi.

Ni jam antaŭdankas vin pro via nemalhavebla kunlaboro.

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"(ekde 2013)

UEA-fakdelegito pri numismatiko

17.04.2024 19:30

Por havi ideon de niaj insignoj mi aldonas ligilon por elŭti kolekton de kongresinsignoj de mi prilaborita, se vi trovas ion interesan mi povos klarigi, laŭ mia scio:
<https://www.bitoteko.it/items/show/1647>

Krom la insignoj ofte estis preparitaj ankaŭ glumarkoj por fermi poŝtenketilojn kun sama temo aŭ specialajn poŝtstampojn; mi havas kelkajn.

Pri la medalo nun mi povas diri ke ĝi estis farita por la kongreso en Verona en la Jaro 1954, el kiu metalo mi ne scias. Ĉefa organizanto de la kongreso estis nia kolego Gino Corso. Verŝajne li mem estis la aŭtoro, aŭ sugestis la temon al la faristo. Aliaj detaloj mi sendos en venonta mesaĝo, nun mi ne havas ĝin enmane, la kvanto estus por la nombro de la partoprenantoj, mi kontrolos kiom da ĉeestis.

Ĝis baldaŭ,

amike

Vito Tornillo

18.04.2024 11:16

Saluton, kara Vito!

Unuavice multan dankon pro via tuja respondo kaj pro la interesaj informoj pri la verona projekto.

Vi pravas ke la objekto estas insigno laŭ uzo, sed tamen por medalistoj ĝi estas samtempe medal(et)o laŭ aspekto kaj ecoj (i.a. duflanka!). Do, ni priskribos ĝin en la rubriko "MONEROJ & MEDALOJ".

Kun multe da intereso mi avide atendas pliajn detalojn kaj pliajn medalojn!

Mi tutkore antaŭdankas vin amike kaj numismate,

(Al)bert(o)

PS ambaŭ mia patro kaj ties patro (mia avo) estis fervojistoj!

19.04.2024 15:31

Kara Bert,

jen la informoj kiujn mi trovis pri la medalo:

- Metal: eble bronzo aŭ fero; mi ne sukcesas difini ĝin. La koloro de la verda stelo estas lakita per malmola lako.
- Eldonjaro: 1954 majo
- Eldonkvanto: la nombro de la kongresanoj estis 583, do verŝajne ĝis 600 ekzempleroj.
- Diametro: 2 cm
- Pezo: 4g inkluzive de la pinglo.
- Medalisto: nomo kaj biografio: LKK de la 6-a IFEF kongreso en Verono, ĉefa organizanto Gino Corso.

Mi opinias, ke por la LKK ĝi ne estis taksita kiel medalo, nur insigno de la kongreso. Pro tio ĝi ne estis klasifikita kiel numismatikaĵo, eventuale nur kiel esperantaĵo. Fakte mi trovis la raporton de la kongreso kaj mi trovis nenion rilate al la medalo, tamen estas informo pri speciala poŝtstampo por la filatelistoj.

Aldone vi trovas aliajn kongresinsignojn kiuj aspektas kiel medaloj, nur unu surfaco kun malantaŭa pinglo, faritaj el diversaj materialoj kiel fero, plasto, ktp. kaj ŝildoj.

Kiel mi diris, ĉiam dum la IFEF-kongresoj estis faritaj glumarkoj por fermi leterojn. Mi havas kelkajn ekzemplerojn: se vi ŝatus mi povus sendi ilin al vi. Ĉu vi partoprenos la EEU-kongreson en Strasburgo? Ĉu vi konas kelkajn samlandanojn kiuj partoprenos?

El belgaj partoprenantoj ni havas plurajn membrojn en Strasburgo; se iu el ili loĝas proksime de vi mi povus transdoni ion al ili.

Pri kolekto de IFEF-esperantaĵoj vi povus kontakti Elda Dörfler el Triesto; mi scias ke ŝi havas multajn aferojn, eĉ mi mem sendis al ŝi glumarkojn kaj poŝtkartojn.

Alia kolektanto estas Michel Basso el Francio, kiu loĝas apud Colmar.

Havu belan tagon!

Vito Tornillo

27.04.2024 17:50

Kara Vito,

Unuavice decas pardonpeti pro la prokrasto de mia respondo, kaŭzita de diversaj privataj eventoj.

Mi tutkore dankas vin pro viaj gravaj informoj kaj pro la aldono de ampleksaj listoj pri esperantaj IFEF-objektoj.

*En tiuj listoj mi trovis kelkajn objektojn kiuj meritas montradon kaj priskribon en venontaj numeroj de nia revuo. Kiel jam de vi farita por la 1954a medaleto, mi petas, se eble, sendi informojn por publikigo de la "novaj" IFEF-medaloj en la rubriko "MONEROJ & MEDALOJ". **Tio tamen ne urĝas! Inter du numeroj de la ENA-revuo kutime estas tri monatoj!***

La medalojn pri kiuj temas mi kunsendas nun aldone. Mi scias, ke ili estis uzitaj dum kongresoj kiel insignoj, sed ili montras ankaŭ elementojn kiuj estas tipaj por medaletoj.

Lasu min antaŭdanki vin kaj promesi recipokan helpon okaze de iu ajn venonta evento en kiu mia helpo estus grava por IFEF aŭ por vi mem!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

18.04.2024 16:08

Saluton kara Manuel,

Al Ana Manero mi promesis sendi belgan bronzan esperantan medalon al la persono kiu sendus al mi kopion de la Silbernik - medalo. Do mi sendos ĝin al vi kiam mi ricevos vian poŝtadreson.

Mi aldone sendos ankaŭ la revuon en kiu la priskribo aperos.

Kun sincera danko kaj amikaj, numismataj salutoj!

Bert Boon

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.04.2024 21:29

Kara Bert

Mi aldonis la numeron al la retpaĝo!

ena-j11n2-202402.pdf (alcl.be)

Met vriendelijke groeten

Albert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.04.2024 21:56

Kara amiko Bert,

Dankon pro plia juvelo en la juvelujo! Kiajn belajn bildojn por la informriĉaj artikoloj, kiel ĉiam.

Aparte bonvena estas la informo pri Otto Dix. Mi plurfoje legis lian nomon kaj konas la germanajn poŝtmarkojn, sed ne sciis/memoris, ke li estis vera esperantisto! Bonvena aldono al mia filatela kolekto.

Amike,

James

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.04.2024 23:03

Saluton Bert,

Mi konfesas, ke originale mi opiniis ke ĉi tiu gazeto estus intereseta, sed mi simple abonis por "subteni". Sed, denove, mi akiris, kaj legis de komenco al fino! Aparte interesea estis la historio de Otto DIX. Mi konis lin kiel artisto sed ne sciis ke li estis esperantisto! Alia famulo kiu ankaŭ estis esperantisto.

Multajn dankojn!

Universero, Trio



27.04.2024 8:43

Dankon Bert, pro la sendado! Estas valora kontribuo al la movado, ke vi tiom zorge raportas pro la aktiveco de la numismatika movado.

kore

Andreas Diemel



29.04.2024 23:46

Kara Bert!

Mi ĉiam gapas dum legado de via revuo! Kaj ĉefe miras pro la imponaj artikoloj kaj admiras vian eminentan laboron, kiu donas la eblon al esperantistaro ekscii pri la grandioza kaj valora trezoro ekzistanta pri esperanto en numismatika kampo!

Dankon, dankon kaj ankoraŭfojan dankon pro via agado!

Amike,

Elda

30.04.2024 11:40

Kara Elda!

Multan dankon pro via tre afabla reago.

Reciproke mi admiras kaj sincere laŭdas viajn rimarkindajn rezultojn en la enhave nemalhavebla kaj moderne paĝaranĝata eldono de la nuntempa "La Verda Lupeo". Niaj revuoj celas ja emfazi la valoron de "etaĵ" kulturobjektoj kiuj atestas kiel niaj iamaj kaj hodiaŭaj aktivuloj pliriĉigis la internacian esperantan kulturon. Jen vivantaj arkivoj agrable konsulteblaj! Daŭrigu ni!

Amike kaj numismate,

Bert



30.04.2024 13:35

Kara Bert,

elkoran dankon pro la nova numero de ENA-Revuo!

Samideane el Kroatio,

Velimir

30.04.2024 14:11

*Kara Velimir!
Tutkoran dankon pro via afabla reago!
Amike kaj numismate,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.05.2024 21:09

Kara Bert,
dankon pro la lasta numero de ENA-revuo. Mi jam finas legi ĝin. Koran dankon. Ĝi estas enhance riĉa kaj leginda, lingve modela kaj aspekte impona. Vi estas vera spertulo pri la numismatiko. Mi bondeziras al vi sukceson en via modela laboro.

Amike
Laimundas Abromas

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.05.2024 8:08

Kara, Bert!
Apude estas mia impresio pri vizito de la numismatika vendejo kun fotoj.
Amike,
Anatolo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

06.05.2024 9:09

Dankon! Mi disvastigos la revuon.
Kun salutojn
Maria Niemyjska
Esperanto Libraro
Bjalistoko

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.06.2024 14:15

Estimata Sinjoro Sowers, kara samideano!
En Usona Esperantisto, n-ro 2013; 4 (jul.-aug) mi vidis artikolon kaj du fotojn pri William Harmon, kiu montras medalon omaĝe donita al li de La Landa Kongreso.
Bedaŭrinde ĝis nun mi trovis nek fotojn de ambaŭ flankoj, nek informojn por priskribi la medalon kiel kutime en la rubriko "Moneroj kaj Medaloj" de nia revuo. Tial mi aldone kunsendas numeron de nia revuo.
Bonvolu sendi al mi la mankantajn bildojn kaj informojn, ne nur por ENA mem, sed ankaŭ por aldoni ĝin al la kompilenda KATALOGO, kiu baldaŭ aperos!
Mi anticipe tutkore dankas vin!
Kun amikaj salutoj el Belgio,
Mag.Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko

23.06.2024 16:34

Saluton Bert,

Mi pardonpetas, sed mi ne scias kiel helpi vin. Vilĉjo forpasis en 2019, kaj lia vidvino Lusi bedaŭrinde forpasis tre lastatempe. Aperos informo pri tio en nia baldaŭ aperonta numero.

Mi kopias la verkinton de la artikolo de 2013, Ĉarli Galvin, kiu eble havos pli da informo.

Plej samideane,

Brandono



17.06.2024 0:29

Estimata s- ro Bert Boon,

Mi estas redaktoro de la revueto "Israela Esperantisto" kaj min impresas artikolo de s-ro L.Abromas.

Ĉu mi povas represi ĝin, referencante kiel fonton vian revuon?

Mi opinias, ke ĝi povos esti interesa ankaŭ por legantoj de IsEs.

Deziranta ĉiajn sukcesojn,

Amike,

Mikaelo Lineckij.

18.06.2024 9:23

Saluton kara samideano Mikaelo,

Volonte mi permesas al vi represi la artikolon kun refero al nia ENA-revuo.

Post dek jaroj, nia fakgrupo bedaŭrinde ne jam havas unu membron el via lando. Do, estus certe interese por ni ambaŭ ne perdi kontakton. Ĉu vi konsentas?

Amike kaj numismate,

Bert (Alberto)

18.06.2024 22:17

Kara Bert,

Dankon pro la permeso republikigi la artikolon.

Jes, mi certe konsentas pri nia laŭpova kunlaboro. Mi eĉ petas vin verki artikoleton pri historio kaj nuna stato de ENA. Nepre aldonu vian foton.

La sekva numero de IsEs devas aperi komence de decembro, al Zamenhoftago.

Amike,

Mikaelo



17.06.2024 10:16

Kara Laimundas,

Hieraŭ mi ricevis peton de israela esperanto-revuo kiu celis mem publikigi la artikolon "Stelo sur la brusto..." kiun vi sendis al ni. Se vi konsentos, ankaŭ mi evidente!

Tutkoran antaŭdankon,

Bert por ENA

18.06.2024 22:13

Saluton kara Bert.

Tiun revueton "Israela esperantisto" mi ricevas kaj legas. Mi ne kontraŭas, ke mia artikoleto aperu en "Israela esperantisto", do vi agu laŭ via bontrovo. Mi bondeziras al vi sukceson en via nobla laboro por kaj per Esperanto. Kun amikaj salutoj

Laimundas



17.06.2024 10:00

Kara s-ano Bert!

Mi ricevis kaj publikigis vian komenton en la retejo "Verda Lampo". Ankaŭ mi dissendis vian informon en la dissendolisto de UkrEA. Esperas mi, ke niaj samideanoj partoprenos en via laboro. Mi dankas Vin pro viaj laboro kaj revuo. Mi komprenas, ke ne ĉiuj esperantistoj estas kolektantoj, sed ĉiam estas interese foliumi "Esperantan Numismatikon".

Tatiana Mykhno

17.06.2024 10:42

Kara samideanino Tatiana,

Multan dankon pro via tuja kaj pozitiva reago. Evidente mi reciproke estos je via servo, se mi iel povus kunlabori kun vi kaj viaj "Verda Lampo" kaj "Verda Lumo"!

Dankon pro viaj laŭdaj vortoj pri nia revuo! Tute reciproke!

Amike kaj numismate,

Bert



19.06.2024 9:51

Saluton kara indonezia samideanino Ilia,

Mi hazarde retrovis vian vizitkarteton, kiun vi antaŭ multaj jaroj, probable dum kongreso, donis al mi.

La celo de mia letereto estas prezenti al vi sukcesplenan fakgrupon pri esperanta numismatiko, helpa scienco de la (esperanta) historio.

Mi petas vin, se vi konsentus, publikigi la aldonitan "varbilon" kiu detale prezentas la projekton, kiu startis en 2013. Bonvolu dissendi ĝin al plejeble multaj indozeniaj kaj alilandaj al vi konataj esperantistoj. (En via lando ni ankoraŭ NE havas unu membron!)

Aldone mi ankaŭ sendas la pli aktualan numeron de nia senpaga revuo.

Mi anticipe dankas vin pro viaj helpo kaj kunlaboro.

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko



ANONCOJ

&

EVENTOJ

BALDAŬ NOVA MEDALO EN GLIWICE!



*En la antaŭa numero ni jam anoncis la baldaŭan aperon de diversaj esperantaĵoj okaze de la jubileo de la 115a datreveno de la esperanto - movado en Gliwice (Pollando). Nia peranto surloke, Stanislaw Mandrak, ĵus informis nin, ke la loka komitato decidis ankaŭ eldoni veran **memormedalon**, kies skizon ni montras ĉi tie. Se vi volas akiri ĝin, bonvolu kontakti samideanon Mandrak, kies retadreson ni jam menciis en la aprila numero!*

Dankon, kara Stanislao!

Impresoj de nuntempa numismatika butiko en Rusio



Numismatika vendejo en Petro-Paŭla fortreso de Sankt-Peterburgo

La 4-an de majo 2024 mi vizitis Petro-Paŭlan fortreson por sciigi pri kondiĉoj por ekskurso al la ŝtata entrepreno *Monera Korto*. Bedaŭrinde la Korto ne funkciis, tamen najbare invitas la turistojn kaj gastojn *Numismatika vendejo*. La riĉa enhavo de la vendejo vere impresis min.

Menciindas la enhavo de la sekvaj montrofenestroj:

- a) memormoneroj arĝentaj kaj oraj, numismatikaj kolektoj;
- b) miniaturaj kopioj de ŝtataj dekoracioj;
- c) suveniraj kaj jubileaj memormedaloj, ĵetonoj;
- d) juveloj kiel kun miniaturaj bestoj, homoj, objektoj;
- e) apudaj numismatikaĵoj;
- f) numismatikaj prospektoj.

Ĉe la enirejo estas eksponataj sportaj moneroj, apude en la montrofenestro medaloj kun diametro de ĉ. 10 cm, dediĉitaj al peterburgaj kaj mondaj eminentuloj (skulptistoj, inventistoj, sciencistoj, sociagantoj ktp). Aparte estas moneroj arĝentaj kun averse famaj konstruaĵoj de urboj-herooj (temas pri urboj kiuj plej kuraĝe defendis la patrujon kontraŭ faŝismaj trupoj dum la Dua Mondmilito).

Kaptas atenton sekvaj moneroj dediĉitaj al protektataj bestoj, zodiakaj signoj, verkistoj, sciencistoj, moneroj kun armiloj averse, monumentoj enlandaj, insignoj, memormoneroj kaj memormedaloj, memordatoj, usonaj moneroj, moneraj kolektoj pri rusiaj regionoj kaj teritorioj.

En angulo aĉeteblas multkoloraj albumoj: “Moneroj de Rusio”, “Moneroj de Sovetio”, “Moneroj de nuntempa Rusio”, “Mondaj moneroj”. Oni povas aĉeti eĉ kolektojn de moneroj kaj monbiletoj diverslandaj.

En aparta montrokesto estas vendataj suveniroj aŭ ŝercobjektoj, kiel dikaj paketoj de rusiaj monbiletoj kun nominalvaloroj je 2000 kaj 5000 rubloj.

Ene de la ekspozicejo troviĝas ankaŭ montrokestoj kun bronzaĵoj kaj arĝentaj juveloj.

Verdire la vendejo estas alloga loko por ĉiuj interesiĝantoj pri la historio de monoj.

Anatolo Sidorov (Majo 2024, Sankt-Peterburgo)

La redakcio tutkore dankas kaj bonvenigas nian rusan samideanon kaj novan membron Anatolo!

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis 169 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be